




Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago,

№ 3, Marto

## Japanio – lando de UK-2007

La plej grava E-evento de la ĉi jaro – Universala Kongreso de Esperanto – okazos la 4-11an de Aŭgusto 2007 en la japana havenurbo Jokohamo.

Nun aliĝis pr. 1400 gesamideanoj el 53 landoj. Kiel kutime – ŝikaganoj! Por vizitontoj eble estos interese konatiĝi kun la libreto de Vasja Cvetkova Vojaĝimpresoj pri Japanio. Inter alie, aŭtorino mem vizitis nia urbon kaj lasis donace unu ekzempleron de la libro. Ŝi asertis, ke verki pri la lando de la Matena suno estas tro malfacila tasko, ĉar vivkondiĉoj, la psikologio de la japanoj estas tre diferencaj disde tiuj en aliaj landoj.. La aŭtorino ne faras ekskursojn en la japanan historion por klarigi la fenomenojn en la vivo de nuntempa Japanio. Ŝi simple malkovras vastan ĉiutagan vivon de la japanoj, ilian rilaton al la eksterlandaj gastoj, ilian intereson al la vivo de aliaj popoloj.. Rakonto estas saturita per multaj konkretaj faktoj, ne preterpasante personan rilaton de la aŭtorino al la lokaj kutimoj kaj klimato. En la libro oni trovas multajn interesajn fotojn. La lingvaĵo de la libro ankaŭ kontentigas: la rakonto estas klara, korekta kaj realisma.



## Rajtigita mortigado

D-ro Leszek Kordylewski parolis surbaze de sia pollingva libro “Problemoj de Bioetiko”. La libro, publikigita de la Jagiellona Universitato en Krakovo, enhavas komikajn bildojn fare de la konata pola desegnisto Andrzej Mleczeko (vidu paĝon 2).




Le prelego titolita “Rajtigita mortigado” koncernis unu de la ĉapitroj de la libro pri vivo kaj morto. La libro estas unika je tio ke ĝi enhavas multajn demandojn rilate al bioetikaj problemoj, sed ne donas iujn respondojn. La respondojn trovas la leganto mem depende de siaj kredo, kulturo kaj eduko. Vivo estas unika fenomeno. Ĝi estas pli facila por detruiri ol krei. Vivo ekzistas en la formo de individuaj estaĵoj: homoj, bestoj, plantoj, mikroorganismoj. Ili ĉiuj spiras kaj kreskas. Ni, homoj, ne kapablas produkti la vivantajn estaĵojn. Ili ekskluzive originas nur de la gepatraj vivantaj estaĵoj.

Ovoj nur venas de kokinoj, kokidoj de ovoj, ne de maŝinoj. Ĉeno de l’vivo daŭras ekde milionjaroj sen interveno de homa teknologio. Ni tamen kapablas haltigi la vivprocesojn, nome murdi la vivestaĵojn. Kio rajtigas nin fari tion? Ni mortigas la mikroorganismojn lavante niajn manojn, ni mortigas plantojn kaj bestojn por nutri sin, ni mortigas fetusojn por ne havi infanojn, ni mortpafas malamikajn soldatojn dum la milito, ni ekzekutas murdistojn kaj aliajn krimulojn. Kiu donas al ni tiun rajton?

Kial mortpuno estas ĝusta en iuj ŝtatoj, sed malpermesata en la aliaj? Ĉu la leĝo tie pravas aŭ malpravas? Kial batalantoj ĵetantaj bombojn estas konsiderataj herooj je unu flanko de la barikado, dum oni konsideras ilin banditoj je la alia? Ĉu ni rajtas helpi la senesperajn oldajn malsanulojn per eŭtanazio? Ĉu ni rajtas memmortigi nin? Kiu rajtas malpermesi tion al ni? Vivo estas unika fenomeno kiu estas sendependa de nia scio kaj teknologio. Ni devas uzi nian scion kaj teknologion por saĝe subteni la vivon, ne detruigi ĝin.

*D-ro L. Kordylewski*



*Kiel kutime, fine de Februaro e-istoj festas la Semajnon de la internacia amikeco. Ankaŭ, la 21an de Februaro UNESKO proklamis kiel Tago de gepatra lingvo. Ĉi jare prez. de UEA R. Corsetti aperigis Deklaracion pri E-o kaj gepatra lingvo. La Deklaracio samtage aperis en la ŝikaga ukrainlingva gazeto kaj nun estas tradukata en la polan. Ankoraŭ unu novaĵo – nia E-anaro denove fariĝis pli ol 20-kapa!*

■ **Koresponda Servo** de Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3, Tokio, Japanio  
Skribante al ni korespondo-peton, bonvolu aldoni viajn aĵon, sekson, profesion, interesojn kaj viajn preferojn por faciligi nia laboron.

■ Sekretario de **RADE** (Rondo Amikara de E-o) Giuseppe Grattapaglia, kiu vizitis nian E-societon en 2005, informis pri la projekto de Rezolucio 07-221 (vidu: [www.rotary.org](http://www.rotary.org)), kiu celas enkonduki E-on “kiel dua lingvo de la Internacia Rotario”. Antaŭ lia propono estas pluraj petante la enkondukon de la hinda, rusa kaj turka lingvoj. Unu propono eĉ petas enkonduki 14 hindajn lingvojn! Oni povas vidi, ke la lingva problemo en R.I. kreskas kaj la racia solvo – uzi E-on kiel duan lingvon por ĉiuj – havas kun la tempo ĉiam pli da ŝanco. La 38 brazilaj delegitoj plejparte pretas subteni la projekt-proponon, ĵuste por komenci plibonigi la mondan komunikadon sen daŭra aldono de pliaj naciaj idiomoj. En la informilo de RADE n.17 vi trovos la tekston de la propono.

■ **Don Harlow** informas pri la reapero de la anglalingva bulteno “ELNA Update”. Li kaj Bill Harris ekos novan serion, kiu aperos la 31an de Marto. Unu 11\*17 cola folio enhavas kvar leter-formatajn paĝojn. La bulteno estas celata por interesontoj pri Esperanto, sed ne por membroj de ELNA. Tamen, anoj de la Asocio, havantaj utilan informon, ne hezitu kontakti: donh @ donh.best.vwh.net kaj bv titoligi vian informon UPDATE.

■ **E-reklamfilmo**: Je la peto de S-ro Ron Glossop, mi elsendas ĉi tiu

## Jen la informoj pri nia sekvantaj kunsidoj:

20an de Marto – Pri sia volontula laboro en Israelo rakontos **Grigorij Dolgin**  
17an de Aprilo d-ino **Gertrude Novak** rakontos pri sia vojaĝo al Irlando  
22an de Majo **Karlo Offutt** prelegos pri E-komponisto Lou Harrison.

**Atenton**: la programo povos esti ŝanĝata. La prelegontoj estas invitataj

## Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktor' Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
[www.esperanto-chicago.org/](http://www.esperanto-chicago.org/)

## Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk  
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

## Membrokotizoj:

Membro-subtenanto ; \$40 jare;  
Familia membro : \$30, Regula: \$20  
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada St, Chicago IL 60607

## Kunvenoj:

**Kunvenoj de membroj de nia societo okazas la kvaran mardon de ĉiu monato kutime en:**

**Sulzer Public Library**, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.  
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

ligon al vi.

Bonvolu dissendi ĝin al aliaj Esperantistoj en la tuta mondo: [http://www.youtube.com/watch?v=ok3N-dtU5\\_k](http://www.youtube.com/watch?v=ok3N-dtU5_k)

Vizitu: [www.amikumumu.com](http://www.amikumumu.com)

